




CC BY-SA 3.0

Luminesk': la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio, Bremen, 28.12.2026 ĝis 03.01-2027

► www.esperanto.de/luminesk

Bonvenon en Bremen

Pli ol tridek partoprenantoj meze de septembro jam aliĝis al la 10-a Luminesk' la jarfina renkontiĝo de GEA. En 2026/2027 ĝi denove okazos en urbo kun longa kaj fama historio. La Hansa urbo Bremen – hodiaŭ kun la eksklavo Bremerhaven memstara Federacia Lando – konatiĝis precipe kiel havenurbo. Ĝi situas ambaŭflanke de la rivero Weser, ĉirkaŭ 60 km enlanden de la maro. Unuaj dokumentoj menciis loĝatan lokon tie jam en la romia epoko, unuan katedralon oni konstruis kiam la loko kristaniĝis ĉirkaŭ la jaro 800. Libera urbo en la tiama regno ĝi fariĝis en la 12-a jarcento, kaj dum jarcentoj ĝi sukcesis konservi sian memstarecon. Kune kun Bremerhaven ĝi hodiaŭ havas ĉ. 707.000 enloĝantojn. Bremen ĝis hodiaŭ restis centro de komerco kaj industrio. Krome ĝi fariĝis universitata kaj scienca centro kaj turisma celo.



Nia kunvenejo

La moderna kaj komforta junulargastejo (adreso: Kalkstraße 6, 28195 Bremen) situas en la urbocentro ĉe la rivero Weser. Ni disponas pri unu- kaj dultaj ĉambroj kun individuaj banĉambroj. La kotizo kiel kutime enhavas ĉiujn manĝojn kaj silvestran bufedon. Vespere en la domo funkcias agrabla trinkejo.



© Die Jugendherbergen im Nordwesten

Programo

Validas la ĝenerala programskemo trovebla en la reto: ni estas plenigantaj ĝin. Certas ke en la kadro de Luminesk' denove okazos la Internacia Vintra Universitato IVU i.a. kun prelego de Amri Wandel pri la aktuala temo „suneklipsoj“. Franz Kruse prelege kondukos nin „de Bremen al la luno“: li laboris en la Bremena firmao, kiu konstruis la plej gravajn partojn de la spacveturilo Orion (konata pro la misio Artemis II). Ilona Koutny parolos pri lingva bildo de la mondo, pri Esperanto en la epoko de Artefarita Inteljekto kaj pri proverboj en Esperanto. La silvestran koncerton denove prezentos Ankie kaj Nanne („Kajto“). Deborah McCarney konatigos nin kun novzelandaj birdoj. Kristin Tytgat kiel en la pasintaj jaroj gvidos paroligan rondon, kiu kunvenos plurfoje dum la semajno. Jen nur malgranda kolekto el multaj programeroj, kiuj faras el Luminesk' vere vizitindan Esperanto-eventon.

Ekskursoj

Bremen estas loko de mondfamaj muzeoj, Bremerhaven la elirpunkto de multaj elmigrantoj el tiama Germanio. Almenaŭ unu granda bierfarejo situas en Bremen. Kaj en la proksimeco troviĝas la vilaĝo Worpswede, kiu fine de la 19-a / komence de la 20-a jarcento fariĝis hejmo de famaj pentristoj. Hodiaŭ pri ili memorigas muzeoj kaj galerioj. La ekskursceloj en kaj ĉirkaŭ Bremen do tiom abundas, ke ni ankoraŭ ne povis definitive decidi. Certas ke kiel kutime la Luminesk'-programo enhavos promenadon tra la urbo (ĉi-foje kun esperantlingva gvidanto), ekskursotagon kaj novjaran promenadon al iu bela celo. Grava informo por posedantoj de la tutgermania bileto por regiona trafiko („Deutschland-Ticket“): kunportu ĝin! Kiel ĉiam ni klopodos ŝpare organizi la ekskursojn kaj uzi publikajn trafikilojn.

Ĉu vi jam aliĝis? Se ne, faru baldaŭ!

Ĉiujn informojn pri Luminesk' (kaj retan aliĝilon) vi trovas en nia retpaĝo:

► www.esperanto.de/luminesk

Se vi aliĝas antaŭ la **25-a de oktobro 2026**, vi ankoraŭ pagas la kotizon de la dua aliĝperiodo.

Ĝis revido en Bremen!

La organiza teamo: Andreas Diemel kaj Ulrich Brandenburg